

# KUJIAATO

numero 220 (2007:4)

ISSN 0023-3692



Kune -  
por pli bona mondo!



Saluton, karaj abonantoj kaj legantoj de *KONTAKTO*!

Venis mia vico unuafoje saluti vin kiel redaktoro de tiu ĉi revuo. Mi esperas (fakte, mi eĉ certas, ĉar mi pretas fari ĉion eblan por tio!), ke sub mia gvido la revuo daŭre restos interesa, diverstema kaj alloga. Nun, eble, al mi iom mankas la redaktora sperto kaj lerto, sed mi penas transpreni de la antaŭa redaktoro ĉion la plej

bonan. Feliĉe, Ĵenja ankoraŭ ne plene lasis la redaktoran stabon kaj dum certa tempo helpados al mi pri ĉiuj revuaj aferoj. Nome de ĉiuj ŝatantoj de la revuo mi dankas kaj gratulas Ĵenja-n pro pli ol kvin-jara elstara laboro kaj antaŭdankas pro ŝia kompetenta helpo!

Kio atendas vin en tiu ĉi numero? Komence vi ekscios pri la relative nova iniciato – kreo de Parlamenta Asembleo ĉe UN, kio celas havigi al la ordinaraĵo civitanoj pli da povo en la internaciaj rilatoj. Poste sekvos la rakonto pri la bedaŭrinda historia okazaĵo de la Salvadorita interna milito. La homaro certe devas bone memori sian pasintecon por eviti la malnovajn erarojn estontece.

La artikolo “La naturo estas unueca organismo” malkovros al vi kelkajn naturajn leĝojn, kiujn la homaro nur komencas koncepti. Poste vi povas ekscii pri la pagodivido, kiu lastatempe tre popularas en Ĉinio – ĝi estas vere interesa kaj facila maniero malgrandigi la malŝparojn kaj fari la vivon ĉirkaŭ si pli interesa.

Poste sekvos iom “teĥnika” parto. Komence bonvolu konatiĝi kun la reta iniciato *Dotsub.com*, kiu havas idealojn mirinde similan al tiuj de la Esperanto-movado – la legantoj de *KONTAKTO* povas legi la intervjuon kun la aŭtoro de la projekto. La sekva artikolo, “Esperanta Vikipedio sub atenta rigardo”, malkovros al vi kelkajn detalojn pri la viki-teĥnologio ĝenerale kaj pri Esperanta Vikipedio aparte. Multaj jam aŭdis aŭ eĉ partoprenis en tiu projekto, sed eble eĉ pli multaj homoj havas iujn miskomprenojn pri tio aŭ tute suprajne komprenas, kiel funkcias tiutipaj retejoj.

Krom tiuj iom “teĥnikaj” artikoloj vin atendas ankaŭ kelkaj kulturilataj kontribuoj: vojaĝ-rakonto pri Suda Germanio, eta raporto pri la ĉi-somera IJK kaj ties kultura programo, malgranda beletra rakonto, bild-raporto pri la finna festo Vappu, “Anguleto”, kelkaj ŝercoj kaj recenzo. La enhavo de la numero estas tre diverstema, do mi esperas, ke ĉiu el vi trovos ion interesan.

Fine mi volus memori al la legantoj, ke *KONTAKTO* estas revuo de la esperantista junularo kaj por la esperantista junularo. Se vi havas ajnan ideon aŭ sugeston pri tio, kiel fari ĝin pli interesa – ne hezitu kontakti la redaktoron. Proponu la temojn, kiuj estas interesaj por vi kaj ne timu verki por la revuo. La baldaŭaj numeroj havos tre vastajn temojn (vd la paĝon 2) – kaj ni esperas je viaj multnombraj kaj interesaj kontribuoj!

Agrablan legadon!

*Paŭlo*

## <ENHAVO>

Nova kampanjo por UN-parlamento (Marcos Cramer, Argentino/Germanio) .....	3
Amasbuĉo ĉe Tenango kaj Guadalupe (Eduardo Navas, Salvadoro) .....	4
La naturo estas unueca organismo (Konstantin Aleksandrov, Rusio) .....	5-6
Pagodivido furoras en Ĉinio (Alice Liu, Ĉinio) .....	6
“Nia celo estas komprenigi la sentojn kaj pasiojn de alikulturaj homoj” (intervjuo kun Michael Smolens) .....	7-8
Esperanta Vikipedio sub atenta rigardo (Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio) .....	9-11
Vojaĝe tra kelkaj urboj de norda Frankonio (Yenovk Lazian, Francio/Germanio) .....	12-13
IJK en Hanojo – diskutforumo pri paco, kunlaboro kaj disvolviĝo (Lai Thi Hai Ly, Vjetnamio) .....	13
Demando pli konvinka, ol la respondo (Paŭlo Mojajev, Ukrainio) .....	14
Beletre: Ŝimo (Maksim Petrov, Kazaĥio) .....	14
Anguleto: Momentaj pensoj pri realeco (Aneta Ubik, Germanio/Argentino) .....	15
Ŝercoj .....	15
Informe .....	15
La finna festo Vappu (Saliko, Finnlando) .....	16

### Kiel sendi kontribuojn al *KONTAKTO*?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ *KONTAKTO* ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj! **Koran antaŭdankon!**

*KONTAKTO*: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro 220** (2007:4), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo**: <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA**: ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)>. **Redakcio**: *KONTAKTO*, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jaito, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <[kontakto@tejo.org](mailto:kontakto@tejo.org)>. **Redaktoro**: Paŭlo Mojajev (Ukrainio). **Grafikisto/vic-redaktoro**: Eugenia (Ĵenja) Amis (Ukrainio/Usono). **Korektisto**: Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado**: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <[skonpres@poczta.onet.pl](mailto:skonpres@poczta.onet.pl)>. **Konstantaj kunlaborantoj**: Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko, (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facillingvaj artikoloj** estas verkita en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de *KONTAKTO*. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj**: Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncetoj**: por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj**: varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj**: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj**: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22.00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <[http://roi.orf.at/esperanto/es\\_demand.html](http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html)> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

# Nova kampanjo por UN-parlamento

Marcos Cramer,  
Argentino/Germanio

**Fine de aprilo 2007 internacia reto de NRO-oj (Ne-Registaraj Organizoj) iniciatis kampanjon por la establo de Parlamenta Asembleo ĉe la Unuiĝintaj Nacioj (UN). La Parlamenta Asembleo alportus la voĉon de la civitanoj al UN kaj pli ĝenerale al la internaciaj rilatoj.**

Nuntempe en UN estas prezentitaj nur la registaroj de la diversaj membroŝtatoj, dum la civitanoj de la membroŝtatoj tute ne estas reprezentitaj. Por forigi tiun mankon de demokratieco sur la internacia nivelo kaj por plidemokratiigi la Unuiĝintajn Naciojn, la kampanjo celas establi novan organon de la Unuiĝintaj Nacioj, kies antaŭvidata anglalingva nomo estas *United Nations Parliamentary Assembly* (Unuiĝint-Nacia Parlamenta Asembleo, mallonge UNPA).

La partoprenantoj de la kampanjo kune subtenas la alvokon, en kiu ili klarigas, unue, ke la homoj kaj popoloj de la tero devas kunlabori por solvi la nuntempajn tutmondajn sociajn kaj ekologiajn problemojn, kaj, due, ke la homoj devas esti pli rekte integritaj en la agadojn de UN, por ke UN estu akceptata kaj konsiderata kiel legitima kaj por ke la internacia kunlaboro estu certigita. La alvoko proponas kiel la unuan paŝon la starigon de konsultiĝa UNPA, kiu komence povus konsisti el la

anoj de naciaj parlamentoj. Poste la asembleo povus ricevi kontrolrajtojn pri UN kaj la organizoj de la UN-sistemo kaj povus esti rekte elektata de la civitanoj de diversaj landoj.

Inter la unuaj subskribintoj de la alvoko estas multaj diverslandaj parlamentanoj, eminentaj profesoroj kaj unu el la antaŭaj ĝeneralaj sekretarioj de UN, Boutros Boutros-Ghali el Egiptio. La alvoko prezentas larĝan kompromison inter la parlamentanoj, NRO-representantoj kaj fakuloj, kiuj konsentas kun la ideo pri UN-parlamento. Nun ĉiuj homoj povas interrete subskribi la alvokon, kaj ĝis junio 2007 jam estas kolektitaj 1200 subskriboj.

Jen la celoj de la kampanjo:

– Plividebligi la proponon pri UNPA en politikaj diskutoj kaj en la amaskomunikiloj;

– Subteni la kreigon de naciaj kaj lokaj retoj de individuoj, NRO-oj kaj parlamentanoj, kiuj pledos por UNPA en sia influŝfero;

– Establi internacian koalicion, kiu kunordigos parlamentajn kaj civil-sociajn agadojn por UN-parlamento;

– Faciligigi la kontaktojn kaj interparolojn inter eble samideaj parlamentoj kaj registaroj.

Oktobre 2007 okazos la *Konferenco por la starigo de tutmonda koalicio por Parlamenta Asembleo ĉe UN* en Ĝenevo (Svislando), ĉe kiu kunvenos ĉiuj parlamentanoj, NRO-representantoj, kampanjaktivistoj kaj fakuloj, kiuj subtenas ĉi tiun celon.



La UN-oficejo en Novjorko

JENJA AMIS

Do kion vi povas fari por subteni tiun gravan iniciaton? Unue, vi povas subteni la alvokon subskribante ĝin en la interreto (ĉe [uncapampaign.org/endorse](http://uncapampaign.org/endorse)). Vi povas informi viajn amikojn kaj kolegojn pri la iniciato, kaj instigi ilin subskribi la alvokon. Vi povas skribi al via parlamentano kaj peti ankaŭ lin/ŝin subteni la proponon (emfazu, ke jam pli ol 400 parlamentanoj tutmonde subtenas ĝin). Vi povas fari donacon al la kampanjo aŭ volontuli por ĝi. Se vi estas membro de iu organizo aŭ partio, vi povas pledi ĉe ĝi ke

ĝi subtenu la kampanjon. Se vi havas retpaĝaron, vi povas enmeti ligilon al la UNPA-kampanjo. Vi povas ankaŭ skribi leteron al gazeto, se estas bona okazo por tio.

Por pliaj informoj pri la kampanjo vizitu la paĝaron [uncapaign.org](http://uncapaign.org). La paĝaro nuntempe estas plene tradukita en kvin lingvojn (la germanan, anglan, hispanan, francan kaj rusan). La alvoko mem estas jam legebla en 24 lingvoj; ankaŭ la Esperanta traduko devas baldaŭ aperi en la retpaĝaro.

## Temoj de la venontaj numeroj de *KONTAKTO*

*KONTAKTO* 221, 2007:5. EKOLOGIO. Ankoraŭ estas spaco por via kontribuo!

Ni vivas en la mondo, rapide kaj aktive evoluanta. Bedaŭrinde, ne ĉiam la homaro sukcesas eviti la problemojn, kiujn kaŭzas ĝia tre rapida evoluo. Tial la demandoj, rilataj al la konservado de la ĉirkaŭa medio iĝas ĉiam pli kaj pli gravaj. Ni invitas la legantojn de *KONTAKTO* priparoli diversajn aspektojn de ekologio kaj medi-konservado en la plej larĝa senco de tiuj vortoj. Rakontu pri viaj spertoj preventi la ekologiajn problemojn, komuniku pri tio, kio (ne) estas farata en via lando por eviti la ekologiajn krizon. La

temo estas vasta kaj ege grava – do partoprenu, diskutu kaj diskutigu!

*KONTAKTO* 222, 2007:6. LITERATURO. Limdato: la unua de decembro, 2007.

La legantoj de *KONTAKTO* estas invitatataj paroli pri literaturo. Temas kaj pri la literaturo ĝenerale (historio, skoloj, problemoj), kaj pri apartaj literaturaj verkoj. Rakontu pri la famaj verkoj, aperintaj en via gepatra lingvo – aĵlandanoj, kiuj plej ofte konatiĝas kun la tradukoj, ofte ne scias kaj ne komprenas la detalojn kaj nuancojn de la verko, por ne paroli jam pri la historia fono kaj kaŝita enhavo. Per Esperanto interŝanĝu la

informojn pri la nacilingva literaturo! La informoj pri malmulte konataj verkoj aŭ pri literaturaj verkoj en "malgrandaj" lingvoj estas aparte interesaj!

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj kaj proponoj estas bonvenaj!

**Atenton! La poŝta adreso de *KONTAKTO* ŝanĝiĝis! Ekde nun sendu viajn paperajn kontribuojn al:**

**Pavel Mojhajej (*KONTAKTO*)**

**ul. Rabochaja 24, kv. 29**

**Jalto, Krimeo**

**UA-98612, Ukrainio**

**La reta adreso estas ĉiam la sama:**

**<[kontakto@tejo.org](mailto:kontakto@tejo.org)>**



La skribajo sur la kruco tekstas: Gekunuloj, falintaj luktante! Ĝis la venko ĉiam!



La pentraĵo tekstas: La 28an de februaro 1983, Amasbuĉo ĉe Tenango kaj Guadalupe; Ili forprenis la floron, sed la radikoj estas burĝonantaj inter ni.

## Amasbuĉo ĉe Tenango kaj Guadalupe

*Eduardo Navas, Salvadoro*

**La 24an de februaro ĉi-jare, mi partoprenis kunmemoradon pri datreveno de unu el la multaj amasbuĉoj, kiuj okazis en mia lando: la fama amasbuĉo ĉe la vilaĝoj Tenango kaj Guadalupe [Tenango, Guadalupe]. Ĝi okazis la 28an de februaro kaj la 1an de marto 1983 en Salvadoro, ŝtato en Centra Ameriko, dum la tempo de la enlanda milito.**

Unu mia amikino, studanta arkitekturon en la sama universitato kiel mi, estas postvivanto de tiu fia tragedio. Tiutempe ŝi estis kvinjara infano, sed memoras multon pri la bedaŭrinda okazaĵo. Ŝi kaj ŝia familio forkuris de la nacia armeo, kiu multfoje uzis la taktikon “Bruligita Tero” en la kamparo, celante mortigi ĉiujn helpantojn de la gerilo.

La rememorado komenciĝis je la 5a vespere (sabate) kaj finiĝis jam matene. Ĉio estis tre agrabla, oni ludis revolucion muzikon, partoprenis meson pri la mortintoj, procesiis tra la antikva vojo (nun duondetruita), kie multaj forkurintoj estis kruele amasmortigitaj, spektis dokumentan filmon pri la vivo de gerilanoj ĉe la monteto Guazapa, spektis fotojn kaj nomojn de la mortigitoj kaj aŭskultis plurajn atestojn de la postvivintoj pri la okazaĵo.

Unu el tiuj atestoj profunde kortuŝis min kaj nun mi volas kundividi la rakonton kun ĉiuj, kiuj eble neniam aŭskultis similan rakonton. La virino, kiu rakontis tion, Morena Herrera, estis tiutempe loĝanto de la vilaĝo Tenango kaj apogis la gerilon. Ŝi komencis sian rakonton dirinte, ke ŝi ankoraŭ neniam venis al la kunmemorado, ĉar ne sciis, ĉu ŝi havos la necesan

kuraĝon por rakonti tion, kio okazis kaj kion ŝi travivis. Jen ŝia rakonto:

“La nacia armeo iris de sur la monteto Guazapa persekutante nin. Kiam ni alvenis al la ebenaĵo Tenango, ni komencis prepari, tiel kiel povis, la tradiciajn salvadorajn suker-blokojn por manĝi ion – memoru, ke ni estis for de nia loĝloko kaj povis kunporti malmultajn aĵojn, ofte ni ne havis eĉ la plej necesajn. Baldaŭ ni eksciis ke la armeo iras ĝuste tien, kie ni ripozis; tial ni decidis malsupreniri al la rivero Quezalapa, kiu dividas la vilaĝetojn Tenango kaj Guadalupe – ni pensis, ke la armeo ne malsupreniros ĝis la rivero kaj ke ni estos tie en sekureco. Post kelkaj horoj venis kelkaj gerilanoj kaj diris al ĉiuj ĉe-riveraj forkurantoj, ke tiuj tuj foriru, ĉar la armeo proksimiĝas. Kaj ĉiuj komencis prepariĝi al la foriro – kune kun la infanoj, gravedaj virinoj, gemaljunuloj kaj niaj malmultaj havaĵoj. Ĉiuj ni (kelkaj centoj) komencis supreniri la monteton Guadalupe, kie ni estas nun. Necesas rimarki, ke tiu ĉi monteto tiutempe ne donis la eblon kaŝi sin.

Kiam la fama armeestro (Kolonelo Domingo Monterrosa) eksciis, ke la homamaso forkuras, li vokis per radio la aerarmeon, ĉar li certis, ke pro la granda distanco liaj soldatoj ne sukcesus atingi nin per piede. Do, la forkurintoj estis inter la terarmeo kaj la tuj falontaj bomboj de la aviadiloj. Trans la monteto kuŝis densa arbaro, kie multaj povus kaŝi sin. Do la nura ŝanco postvivi estis provi supreniri la monteton, atingi la arbaron kaj kaŝe forkuri tra la arbaro ĝis sekura loko.

Aerarmeo rapide venis... kaj la amasbuĉo komenciĝis. Mi sukcesis trapasi la monteton antaŭ la alveno de la aerarmeo,

sed mi aŭdis post mi la mortokriojn de la personoj trafitaj de la bomboj, raketoj kaj grenadoj, ankaŭ la mortokriojn de la ĉevaloj, kiuj portis la sukerblokojn por manĝi. La bombado daŭris de la 11a matene ĝis la noktigo la 28an de februaro 1983. Multaj (proksimume 250) personoj pereis ĉi tie, sur tiu ĉi monteto.

Jam nokte, kelkaj kuraĝuloj revenis kaŝe al la rivero por kunpreni la postvivintojn kaj iujn mortintojn. Antaŭ la mateniĝo ni foriris de ĉi tie tiel kaŝe kiel ni povis. Oni scias nun, ke sekvamatene, la 1an de marto 1983, la terarmeo surpaŝis la monteton mortigante la malmultajn postvivintojn, netrovitajn de la gerilanoj dum la antaŭa nokto. La soldatoj mortigis ilin per plej kruela maniero: surverŝante acidon sur vundojn, sur la vizaĝon, kaj poste tranĉante la kapon.”

Morena apenaŭ sukcesis fini la rakonton pro ekploro.

De post tiu fora kaj tamen proksima tago, la rakontantino ne revenis en la lokon, kie ĉio ĉi okazis, ĝis nun, 24 jarojn poste, kiam multaj aliaj homoj venis agnoski la dignon de tiom da viktimoj, kiuj tiel multe suferis, tute maljuste. Nun en tiu loko staras modesta monumento, granda gravurita tombo, kiu enhavas kelkajn ostojn, trovitajn post kelkaj jaroj.

Homaro certe devas memori sian propran historion por pli bone “verki” la estontecon, kaj tio certe eblas nur pere de kunhelpo de ĉiuj ni, de ĉiuj niaj memoroj. Mi invitas ĉiujn batali kune por la pli bona mondo, por humana mondo, por alia ebla mondo!

“La tuta mondo estas subordigita al unueca leĝo, en ĉiuj raciaj estaĵoj troviĝas la unueca racio. La vero estas unueca, kaj por raciaj homoj ankaŭ la nocio de perfekteco estas unueca.”

*Marko Aurelio*

*Konstantin Aleksandrov, Rusio*

Ĉiuj elementoj de la naturo estas komplete interligitaj. Nun tiu ligo iĝas pli kaj pli klara kaj estontece ĝi riveliĝos tiom, ke nenia nia fizika movo aŭ penso povos esti hazardaj. Tiam ili postulos ĝustan komprenon de la influo al la tuta mondo.

Ni ekzistas en ia grandega unueca komplekso, sfero, ene de kiu niaj deziroj, pensoj kaj agoj estas ligitaj al la agado de ĉiuj aliaj, kaj se ni ne sentas nian influon al ili, tio ne signifas, ke ni ne agas. Hodiaŭ ni povas konvinkiĝi pri la ĝusteco de tiu aserto, spektante la influon de homo al la naturo, al diversaj fizikaj procezoj. Aldone, ju pli supras la morala, sed ne fizika nivelo de nia interagado kun la naturo, des pli forta kaj profunda estas nia efiko al ĝi. Ĝuste ĉi tie ni devos nin korekti, tio estas, alkonduki nin al la ekvilibro kun la naturo.

### **La naturo nenion kreas vane**

Unue: el ĉio sentata de niaj sensoroj kaj el ĉio analizata fare de la konscio ni povas konkludi, ke la naturo nenion kreas vane. Tial estas malpermesite perforti la naturon aŭ homon (kiu estas ĝia elemento), ĉar ĉiu perforto al la homa, la animala, la planta kaj la malviva mondoj, ĉiu kruda enmiksiĝo rezulte speguliĝas en ĉiuj niveloj de la naturo, kaj, ĉefe, en la homa. Estas malfacile imagi tion, sed la civilizo devas kvazaŭ halti! Ni ne havas la rajton turni riverojn aŭ ŝanĝi iujn naturajn interligojn. Ni devas fari preskaŭ nian agadon ĝis ni cer-



# La naturo estas unueca organismo

tiĝos, ke ĝi plene konformas al la leĝoj de la naturo.

### **La procezo de evoluo de la naturo estas celdirektita**

Due: la procezo de evoluo de la naturo estas celdirektita. Eblas diri, ke la homaro troviĝas nun en sia intera stato, simile al nematura pomo, ankoraŭ ne preta por la konsumado, ĉar ĝi estas en la procezo de maturiĝo. Nur tiuj, kiuj komprenas la leĝojn de la naturo, vidas la tutan procezon de la evoluo, kaj, plej ĉefe, ĝian celon; ili scias, ke tiu malgranda acida frukto, finmaturiĝinte, iĝos bela kaj utila. Ni hodiaŭ travivas procezon de evoluo, kaj tial ni devas korekte moviĝi kun ĝi, ne malhelpi kaj ne haltigi ĝin. Pro tio, ke ni estas racia parto de la naturo, ni devas lerni konscie konformi al ĝiaj leĝoj, studante kaj konceptante ĝian programon. La naturo havas proprajn leĝojn. Kaj tio estas

ne nur leĝoj de la malviva, la planta kaj de la animala partoj de la naturo, studante kiujn ni povas supozi, ke ekzistas antaŭstarigita celo. Ni devas konfesi la ekziston de la leĝo, kiu inkluzivas programon de evoluo ankaŭ por la homa socio ekde ĝia naskiĝo kaj inkluzive ĉiujn ĝiajn etapojn de evoluo, ĝis la fina, perfekta stato.

### **Lerni de la naturo**

Ni iom post iom venas al la konkludo, ke ĝuste la racia naturo, kiu inkluzivas en si ĉion, gvidas la homon, sed ne male. Same kiel ni lernas de la naturo vivi en la ĉirkaŭa mondo, kreante ĉiaspecajn ilojn kaj aparatojn, ni devas trastudi ĝiajn leĝojn en la nivelo de homaj interrilatoj. Kiel fari tion, por ke la homo povu, obeante ilin, atingi certan ekziston kaj feliĉon?

El nia observado de homo ni venas al la konkludo, ke por ĉiu homo propras la egosima

deziro ĝui, la strebo venigi sin al komforta stato. Egoismo puŝas nin sekvi la ĉefan principon – ricevi maksimumon da ĝuo ĉe minimumo da penoj. La problemo estas, ke homo ne scias, kiamaniere interagi korekte kun siaj similuloj. Ni ne agas harmonie. Ĉiu deziras preni ĉion por si, sed ĉu en tiaj interrilatoj troviĝas la apartaj elementoj de la naturo en la malviva, la planta kaj la animala niveloj?

La vivo de planto kaj de animalo iĝas ebla nur pro altruisma rilato, kiu ĉeestas en ĉiu ĉelo kaj en la tuta korpo. Se ne estus tiu altruisma rilato, neniu viva organismo povus ekzisti. La rezigno pri sia memstareco fare de ĉiu ĉelo, kiu metas interesojn de la tuta korpo super la proprajn, estas necesa kondiĉo de ekzisto. Ekzemple, se korpo donas komandon morti al difinita ĉelo – tiu tuj ĉesas ekzisti. Tiel funkcias ĉiuj vivaj organismoj. Miliardoj da ĉeloj mortas kaj renoviĝas –

konstante! – kaj tio ebligas la pluvivon de la tuta organismo. Nur la kancera ĉelo rifuzas plenumi la komandojn de la korpo, ne deziras limigi sin. Anstataŭ tio ĝi komencas manĝi aliajn ĉelojn, sed, mortiginte ilin, ĝi detruas ankaŭ sin.

Neniu organo ekzistas pro si mem. Imagu renojn aŭ koron, kiuj funkcias egoisme kaj rifuzas provizi la tutan organismon. Same funkcias la tuta naturo ĝenerale – plantoj, insektoj, birdoj, animaloj. Ĉi tie mankas egoisma reciproka utiligo aŭ neniigo. Do, en ĉiuj niveloj de la naturo la leĝo de altruismaj rilatoj estas necesa kondiĉo de ekzisto kaj evoluo. Tiel apartaj ĉeloj eliras en la nivelon de ekzisto de

vivaj organismoj. Neniu elemento de la naturo povas ekzisti per si mem; la vivo eblas nur en la ligo kun ĉiuj aliaj partoj, en plena ekvilibro kun ili, en simileco al la tuta naturo – tio estas, konforme al la programo de ĝia evoluo, agante renkonten al ĝia celo.

Tial ni nomas altruismo la agojn, kiujn gvidas la ĉio-enhava celo. Nur ago, farata pro tiu celo, nur realigo de la intenco de la naturo mem nomiĝas altruisma. Sed homo, transirante de la fiziologiaj bezonoj de la korpo al la sociaj rilatoj – strebo al riĉeco, potenco kaj scioj – entute detruas la harmonian ligan kun la naturo. La procezo de nia evoluo postulas trovi kaj

ekvilibrigi tiun ligan. Nur tiam ni povos korekte kaj komforte ekzisti.

Homo, tiamaniere, supreniĝas al alia nivelo de ekzisto. Li komencas senti eternan, perfektan naturon kaj sin mem tia. Interne de tiu korekta altruisma interrilato naskiĝas vertikala, nova supreniĝo de la homaro al tute alia nivelo de ekzisto. Estiĝas transiro de egoisma interrilato al tiu altruisma, eliro en la nivelon de la naturo mem, kiu nin ĉirkaŭas kaj gvidas. Ni iĝas egalaj al ĝi. Jen estas ĝia intenco, tion ni devas atingi.

Laŭ la materialoj de [www.kabbalah.info](http://www.kabbalah.info)

## Pagodivido furoras en Ĉinio

Alice Liu, Ĉinio

En pasinteco, laŭ ĉina kutimo, la gast-ig-anto, kiu invitis la amikojn, pripagis mem la tutan koston de ĉio: manĝaĵo, trinkaĵo, ktp. Nun en ĉinaj urboj estas populare dividi la pagon inter amikoj aŭ kolegoj. Tio jam fariĝis furora en Ĉinio.

### Kion dividi?

Dividi manĝo-pagon estas populara afero por fraŭloj kun mez-granda **salajro**, ĉar manĝante solaj ili ofte ne havas bonan manĝ-deziron. Tial kelkaj homoj povas manĝi tri- au kvinope. Ili dividas la pagon, do ĉiu devas pagi malgrandan sumon, sed ĉiuj gustumas diversajn manĝaĵojn kaj iĝas plene kontentaj.

Urba **trafiko** estas alia problemo de **salajruloj**, ĉar preni aŭtobuson estas lacige, aĉeti propran aŭton estas multkoste kaj preni **taksion** estas mal**ŝpar**-eme. Oni publik-igas multajn anoncojn pri kuna aŭto-veturado. Ekzemple, se mia oficejo estas la cel-loko, kelkaj aliaj personoj, kiuj devas fari la saman vojon, povas kune kun mi preni aŭton kaj dividi la pagon laŭ la longeco de la vojo. Dividante la **trafikan** pagon kun siaj **kolegoj**, oni povas **ŝpari** multe da mono.



KOMPLEZE DE LA AŬTORO

Facila

Ankaŭ junuloj dividas la pagojn dum aĉetado. Dum festoj grandaj vendejoj proponas al la aĉetantoj kuponon, per kiuj eblas **ŝpari**. Sinjorino Su, kiu laboras por iu gazeto, foje multe gajnis per tia aĉetado. Iam dum feria semajno unu komercejo promesis, ke aĉetinte ion kontraŭ 800 **juanoj** ĉiu ricevos kuponon, kiu valoras 300 juanojn. Su interkonsentis kun siaj du **koleginoj**, ke ili kune aĉetu pli-bel-ig-ilojn. Pro tio, ke la tuta sumo de ilia aĉeto superis 800 juanojn, ili ricevis la kuponon, kies valoron ili dividis por aĉetado de novaj donacetoj. Kaj ĉiuj estis ege kontentaj!

### Kia rezulto?

Kuna aĉetado estas la afero kutima por urbegoj. Dank' al ĝi oni pli bone komprenas, kiel eblas **ŝpari** monon; krome, la komuna aĉetado pli-facil-igas kun-laboron kaj komunikadon inter la homoj, kies socia rondo rezulte pli-grand-iĝas.

Kiam la homoj dividas la mal**ŝparojn**, ili povas kune ĝui la plezuron. La kuna aĉetado estas bona ideo kaj moderna viv-maniero. La urbanoj, dise loĝantaj en apartaj loĝejoj, malgraŭ tio, ke ili ĉiutage renkontiĝas, ofte ne havas la kialon por profunda interparol-ado. Kuna aĉetado kun-igas la homojn kun la samaj

ŝat-okupoj kaj helpas al ili komuniĝi kaj inter-ŝanĝi la pensojn.

**ĉino** – Ĉin-i-o estas la plej granda lando, plene situanta en Azio

**furori** – esti ege populara

**juano** – ĉina mono

**kolego** – sam-labor-ej-ano aŭ sam-fak-ulo


**salajro** – la mono, kiun oni regule ricevas pro la farata laboro

**taksio** – publika aŭto, kiu povas veturi kien ajn, laŭ la deziro de la kliento (la uzanto de la servo)

**trafiko** – moviĝo de ĉiuj aŭtoj kaj transport-iloj en la urbo (por transporti la homojn, la produktojn ktp)

**ŝpari** (pri mono) – ne uzi, konservi, lasi por alia uzo; **malŝpari** – uzi tro multe, ne lasi por estonteco

# “Nia celo estas komprenigi la sentojn kaj pasiojn de alikulturaj homoj”



**La reto ĉiam proponas plej interesajn kaj nekutimajn eblojn por la uzantoj. Unu el la relative freŝaj projektoj, mirinde simila “idee” al la ideo de Esperanto, estas la paĝaro Dotsub.com, kiu celas ebligi facilan subtitoladon de diversaj filmoj. Jen la intervjuo kun la aŭtoro de la ideo – Michael Smolens.**

– Ĉu vi povas diri, kio estas [www.dotsub.com](http://www.dotsub.com) kaj kiel ĝi diferencas disde la aliaj filmaj retejoj?

– *Dotsub* estas retumil-bazita programaro, kiu ebligas provizi filmojn je subtitoloj en ilia origina lingvo (povas esti kiu ajn lingvo, kun nekutimaj signoj, kun inversa skribdirekto ktp); poste tiuj subtitoloj povas esti tradukitaj al kiu ajn alia lingvo sen elŝutoj, sen specialaj spertoj aŭ trejnado. Ĉio funkcias jene: oni unue alŝutas filmon al *Dotsub* (en ajna formato – *wmv*, *quicktime*, *real*, *flash* aŭ aliaj). Tiam ni konvertas la filmo-dosieron al *Flash*, same kiel faras aliaj filmaj retejoj, sed samtempe ni aldonas nian “sekretan saŭcon” al la dosiero por ebligi la funkciadon de ĉio.

Malgraŭ tio, ke ni proponis kunlaboradon al profesiaj subtitolistoj kaj profesiaj tradukistoj en dekoj da lingvoj, la tuta laboro plejparte estas fara-

ta de pasiaj volontuloj el la tuta mondo. Al ni helpas la homoj, kiuj volas, ke specifaj materialoj estu alireblaj en specifaj lingvoj, por ajna kialo, do ili volontule fordonas sian tempon por subtitoli filmon, kiun ili trovas grava aŭ en la originala lingvo aŭ en traduko. Foje la filmo estas tradukata al 25 lingvoj dum 6 semajnoj – kaj ĉio ĉi fare de anonimaj volontuloj! La tuta laboro estas liberfonta, vikiieca, do ĉiu ajn povas ŝanĝi, aldoni ion ktp. En la plej multaj okazoj, la kreinto de la filmo ne havas monon por profesia traduko, sed li havas multe da amikoj, kiuj parolas multajn lingvojn, do li petas, ke ili traduku ĝin – kaj jen: filmo videblas en dekoj da lingvoj senkoste kaj sen speciala programaro.

La rezulta filmo povas esti kopiita al alia retejo aŭ blogo en ĝia multlingva formo. Ni jam vidis, ke filmoj rapide disvastiĝas en 10-25 lingvoj, kaj poste aperas en centoj da plejparte fremdlingvaj retejoj kaj blogoj – kio kreas senfinan eblon por interkultura komunikado. Estas interese, ke inter miloj da filmoj, jam alŝutitaj al *Dotsub*, ni havis nur unu pornan filmon, kaj tute mankas la filmoj, kutimaj ĉe la aliaj filmaj retejoj (ekzemple, iuj studentoj, kiuj stulte ludas). Nia enhavo estas ĝenerale serioza, intelekta kaj grava – bonega neintencita konsekvenco, kiun ni neniam antaŭvidis.

– Kio estas la celo de *Dotsub*? Kial vi kreis ĝin?

– Nu, la plej granda celo de *Dotsub* estas la tutmonda rekono – por ke *Dotsub* estu uzata kiel instrumento de ĉiu, kiu iam ajn pensis pri multlingvaj filmoj. Ni jam ekpaŝas sur tiu vojo. Tamen, ĉe la pleja komenco la motivoj, kompreneble, estis iom aliaj. Mi kreis *Dotsub* pro la frustrigo: kiudirekten iras la mondo? Kial

la homoj eksplodigas sin, direktas aviadilojn en konstruaĵojn ktp? Mi sentis, ke unu el la kernaj kialoj por tio estis la neeblo kompreni la sentojn, pasiojn kaj rakontojn de alikulturaj homoj. Parte pri tio kulpas la lingvaj baroj, parte – la ekzistantaj limoj pri kopirajto kaj distribuaĵo, kiuj venas kun la tradicia hollywooda proviza ĉeno – la filmo devas esti nekredible bona kaj profesia por ke ĝi estu disvastigata kaj videbla. *Dotsub* estis kreita por permesi, ke iu ajn povu vidi ion ajn kreitan en kiu ajn lingvo uzante liberfontan, komunuman pensadon de Ret 2.0.

– Mi rimarkas ke vi ŝajne subtenas la permesilon de la Krea Komunaĵo, sed mi vidis ankaŭ apartajn permesilojn de *Dotsub*. Kial la Krea Komunaĵo gravas al *Dotsub*

toj povu facile elekti la necesan permesilon per uzant-amika menuo. Nia intenco estas ankaŭ ebligi, ke la filmo-farantoj kaj rajto-posedantoj povu enspezi monon, uzante niajn ilojn, do niaj permesiloj ebligas ankaŭ tion.

– Mi aŭdis kelkajn plendojn pri tio, ke malfacilas labori kun grandaj filmoj en *Dotsub*, ĉar nuntempe ne ekzistas la maniero importi dosierojn kun la subtitoloj. Ĉu vi planas aldoni ion tian estontece?

– Oni ja povas subtitoli longajn filmojn en nia retejo, sed nia originala beta-kodo vere estas ne tre efika kaj rapida – pri tio ni fakte laboras nun. Jam eblas elŝuti subtitoldosieron kun la tempaj kodoj por ĉiu filmo en ĉiu lingvo; poste oni povas traduki ĝin sen



La Esperanta sekcio de *Dotsub.com*

kaj ĉu vi povus klarigi kiel funkcias la permesiloj de *Dotsub*?

– Ni volas certigi, ke la kreado kaj havado de iu ajn enhavo povu plene regi ĉion, kio estas farata kun tiu enhavo, kaj permesi, ke la aliaj povu uzi la enhavon kiel ili volas. Tradicia kopirajto ofte ne permesas tion, diference de la Krea Komunaĵo. Ni vere kredas je la misio de ties permesiloj. Nun ni okupiĝas pri plena reverkado de niaj permesiloj, por ke la uzan-

konstanta ret-konekto, kaj poste simple alŝuti al la paĝaro. Post kiam ni finos la duan version de nia retejo kaj iloj dum la venontaj monatoj, ni esperas aldoni la eblecon importi subtitoldosierojn, faritajn per famaj programoj, kiel “Final Cut” aŭ “Adobe Premiere”. Ankaŭ inverse – ĉiuj dosieroj, faritaj per nia ilaro estos facile importeblaj por tiuj programoj. Tio certe estas alta prioritato por ni.

– Kiujn plibonigojn ni

**povas atendi dum la venontaj monatoj ĉe Dotsub?**

– La tuta retejo estos aliaspektigita, kaj la tuta kerna teknologio estos reprogramita. Ni baldaŭ havos la eblon aŭtomate konverti niajn filmojn de Flash-formo al mpg4-dosieroj, kiuj poste povos esti

facile uzablaj per poŝkomputiloj. Ni ankaŭ traktas kun aliaj firmaoj pri integriĝo de Dotsub en ilojn, kiuj estas konektitaj rekte al televidiloj por ebligi, ke filmoj estu mendeblaj en specifaj lingvoj. Aldone, ni laboras kun diversaj telekomunikadaj firmaoj

por ke la filmoj povu esti liverataj al porteblaj iloj kiel poŝtelefonoj.

– **Kiel la legantoj de KONTAKTO povas kontribui al via projekto?**

– Ĉiu ajn povas alŝuti siajn filmojn al Dotsub ajnformate, kaj poste provizi subtitolojn

por siaj filmoj kaj por aliaj filmoj. Tio estas ege facila!

– **Dankegon pro la intervjuo, ni deziras sukcesojn al via projekto!**

*Intervjuis Chuck Smith (Usono/Germanio)*

## Esperanta Vikipedio sub atenta rigardo

“Imagu la mondon, en kiu ĉiu unuopa persono sur la planedo havas liberan aliron al la sumo de homara scio. Jen al kio ni strebas”

*Jimmy Wales, la iniciinto de Vikipedio*

“La problemo de Vikipedio estas, ke teorie ĝi ne povas funkcii, nur reale”

*Stephen Colbert, televida moderato*

*Aleksandro Galkin, Rusio/Germanio*

**La interreta teknologio “vikio” (de la havaja krivorto “wiki-wiki” – “rapide”!) famiĝis ĉefe pro ties apliko en plurlingva libera reta enciklopedio “Vikipedio”, kiu kun kelkaj idaj projektoj estas enterprenaĵo kaj ĉefokupo de la usona nekomerca fondaĵo “Wikimedia”. Kvankam la teknologio mem vere bone taŭgas por enciklopedio, ties primara celo estis ebligi facilan kaj fruktodonan kunlaboron de pluraj homoj super komunaj interligitaj dokumentoj, kiam ĉiu redaktanto povas ŝanĝi la tekston sen timo nerenversigeble forigi aŭ kripligi parton de tiu dokumentaro. Laŭ la unua supraĵa pripensoj oni povas decidi, ke la projektoj, kiuj baziĝas sur tiu teknologio, devas esti tute kaosaj kaj anarkiaj, kaj ke la efikeco de**

**tiu kunlaboro estas nealta. Tamen, kiel montras la ekzemplo de Vikipedio, tiu tipo de volontula nedirektata kunlaboro povas esti ege bona por retaj komunumoj, kies membroj kontribuas al la projekto volontule kaj sen (troaj) devoj.**

**La ideo de Vikipedio kaj ĝia ofta miskompreno**

Bedaŭrinde, multaj homoj, supraĵe

ilspecaj periodaĵoj, ekzemple, al la sciencaj revuoj, kiuj publikigas nur superrigardajn artikolojn.

Tiu, kiu ekkonas la ideon de Vikipedio iom pli profunde, ol pere de ties nomo, nepre renkontas la ĉefajn principojn de Vikipedio, kiujn konas ne ĉiuj “pasivaj” subtenantoj aŭ oponentoj de la projekto. La plej unua principo donas la jenan difinon de Vikipedio: “Vikipedio estas enciklopedio, kiu estas verkata por doni profiton al ties legantoj. Ĝi enkorpigas la elementojn de ĝeneralaj enciklopedioj, specialaj enciklopedioj kaj almanakoj”. Tiu difino klare montras, ke kvankam Vikipedio estas enciklopedio, ĝi havas elementojn de aliaj verkoj, inter kiuj ankaŭ la almanako.

Tio ne estas hazard-

da, ĉar Vikipedio baziĝas grandparte sur la retaj fontoj, kies vereco ne ĉiam estas bone pruvebla. Sed estante “kompilaĵo” Vikipedio, tamen, plu donas bonan superrigardon pri la temo. Alia grava principo de Vikipedio estas “Vikipedio mem ne povas esti fonto de informo”. Do, oni uzu Vikipedion nur kiel helpan deirpunkton – sed neniel kiel fidindan fonton; kiel la lastajn oni uzu paperajn faklibrojn kaj fakrevuojn.

**Ne nur enciklopedio**

Kontraste al ĉiuj aliaj enciklopedioj en la mondo, kiuj dekomence estis unulingve evoluigataj kaj nur poste tradukataj al aliaj lingvoj, Vikipedio estas dekomence multlingva kaj multflanka enciklopedio, kie ĉiu lingva sekcio evoluas memstare kaj sendepende pere de la penoj de ties lingva komunumo. Tiu multlingveco donas al Vikipedio grandan fleksiĝemon, ĉar preskaŭ por ĉiu temo troveblas “loka eksperto”, kiu povas doni ekzaktan kaj korektan informon pri certa loko, lando, lingvo aŭ kultura fenomeno. Tiel la artikoloj, kiuj ricevis statuson de elstaraj artikoloj en certaj lingvaj sekcioj de Vikipedio, estas tradukataj por kompletigi artikolojn en aliaj lingvoj. Tiu interago kaj “dialogo” inter pluraj Vikipedioj kondukas al pli neŭtrala kaj adekvata enciklopedia enhavo.

Enciklopedia enhavo per si mem ne

estas homogena. Por ilustritan informon oni ofte enmetas bildojn, sonojn (prononc-helpojn aŭ aŭdio-artikolojn por handikapitoj) aŭ matematikajn formulojn. Krome, ne ĉiun informon eblas meti en la enciklopedian artikolon: en la artikolo pri Indira Gandhi aŭ Dalai Lama oni apenau povas citi ĉiujn iliajn famajn diraĵojn. Ĝuste pro tio la ĉefa enciklopedia trunko disbranĉiĝis je kelkaj idaj projektoj, kiuj kompletigas kaj





**Tabelo 1. Vikipedio kaj ties idaj projektoj  
(stato por la 2-a de aŭgusto, 2007)**

Nomo	Kiam lanĉita	En kiom da lingvoj ekzistas	Pozicio de la Esperanta parto	Kvanto de la artikoloj en la Esperanta parto	Priskribo
 Vikipedio	15-an de jan. 2001	252	16	86 698	Ĉefa enciklopedio kun pli ol 7 milionoj da artikoloj en 250 lingvoj.
 Vikivortaro	12-an de dec. 2002	172	70	426	Multlingva vortaro kun sinonimoj, etimologio, klarigoj.
 Wikilibroj	10-an de jul. 2003	120	26	311	Libere legeblaj kaj elŝuteblaj libroj pri diversaj temoj.
 Wikicitaro	20-an de jul. 2003	87	30	225	Kolektoj de diverslingvaj citaĵoj laŭ la temoj kaj fontoj/personoj.
 Wikifontoj	24-an de nov. 2003	53	—	ĉ 200	Projekto por kolekti diversajn fontojn: historiajn dokumentojn kaj aliajn tekstojn. Esperanto-dokumentoj dume troviĝas en kadre de la projekto Wikilibroj.
 Vikinovaĵoj	3-an de dec. 2004	22	—	—	Novaĵoj de civilaj ĵurnalistoj el diversaj landoj. Dume aperas kiel parto de Vikipedio.
 Komunejo	7-an de sep. 2004	—	—	—	Centra deponejo por bildoj, sonoj, videoj kaj aliaj netekstaj informoj, komune uzataj de ĉiuj Vikipedioj.
 Inkubatoro	?	—	—	—	Speciala projekto por testi novajn lingvojn kaj idajn projektojn en tiuj lingvoj.

universaligas la enciklopedian enhavon de sia patro Vikipedio.

El la tabelo 1 oni povas vidi, ke Esperanto-projektoj kutime ne estas bone evoluantaj, la sola pli-malpli aktiva projekto estas Esperanta Vikipedio, kiu estas nun la 16a Vikipedio laŭ la grandeco. Tamen, ne malpli grave estus evoluigi ankaŭ la idajn projektojn: en la reto ekzistas multaj diversaj Esperanto-bibliotekoj kun plenaj tekstoj. Tiujn oni povus ŝovi al la Wikifontoj, kiu povus esti bona loko por ĉiuj liberaj tekstoj en Esperanto. Apartan atenton meritas relative nova projekto de la fondaĵo “Wikimedia”: Vikiversitato. Estas projekto kun la celo helpi al la homoj kunlabori pri diversaj manlibroj, helpiloj kaj aliaj instrumaterialoj (do, iom simila al jam ekzistanta projekto edukado.net). Tamen, ĉi tie la temoj povas esti tute vastaj, de scienco ĝis arto. Laŭ mia opinio, tiu ĉi projekto povus esti ege grava por Esperanto, ĉar en Esperanto

preskaŭ ne ekzistas lernolibroj kaj gvidlibroj ne pri Esperanto, kio iom malhelpas al scienca evoluo de la lingvo. La ĝermo de Esperanto-projekto estis lancita ĉe Wikilibroj, sed dume mankas vera gvidanto por puŝi la aferon antaŭen.

### Nomspacoj kaj titoloj

Ne ĉiu dokumento, kiu estas en Vikipedio, devas nepre esti artikolo. Vikipedio havas diversajn *nomspacojn*, kiujn oni povas imagi kiel lokojn por diverstipaj dokumentoj (kaj malsamaj dokumentoj kun la sama nomo povas ekzisti en malsamaj nomspacoj). La ĉefa nomspaco nomiĝas “Artikoloj” kaj enhavas ĉiujn artikolojn de Vikipedio. Ĉar ĝi estas la ĉefa nomspaco, oni neniel devas aparte indiki ĝin. Krom tiu nomspaco ekzistas samgranda nomspaco “Diskuto”, kiu enhavas ĉiujn diskutpaĝojn. Ĉiu vikipedia artikolo havas propran diskutpaĝon, en kiu la kunlaborantoj pridiskutas la aferojn, rilatajn

al la artikolo, interŝanĝas opiniojn kaj (sufiĉe ofte) solvas *redaktokonfliktojn*. Diskutpaĝoj estas esenca parto de la vikipedia kunlaboro; ekz., en la anglalingva Vikipedio estas tre kutima afero, kiam diskutpaĝoj estas multe pli longaj, ol la artikolo mem – en la tiel nomataj “mezgrandaj Vikipedioj” tio estas pli malofta fenomeno.

Alia ne malpli grava nomspaco estas “Vikipediistaj paĝoj” kaj “Vikipediistaj diskutoj”. Tiuj du nomspacoj similas al la nomspacoj “Artikoloj” kaj “Diskutoj”, sed entenas la informon pri unuopaj registritaj kontribuantoj. Ĉiu novregistrita kontribuanto aŭtomate ricevas propran vikipediistan paĝon, en kiu tiu povas prezenti sin kaj skize prezenti tie la informon, kiu ebligas efikan kunlaboron. Oni povas, ekzemple, indiki la parolatajn lingvojn, iujn (mal)satojn, (mis)preferojn de la uzantoj kaj ilian apartenon al certaj grupoj.

Plia grava elemento de Vikipedio estas la nomspaco “Ŝablono” kun la responda subspaco “Ŝablona diskuto”. Ŝablonoj estas kvazaŭ reuzeblaj konstru-ŝtonoj, kiujn oni povas enmeti sur plurajn paĝojn. Ekzistas statikaj ŝablonoj, kiuj simple aldonas iun bildon (ekzemple flagon de certa lando), tekston ktp. Sed ekzistas ankaŭ la dinamikaj ŝablonoj, kiuj ebligas ŝanĝon aŭ precizigon de sia enhavo surbaze de la infomo, kiun oni aldone indikas ĉe enmeto de la ŝablono. Ekzemple, multaj altkvalitaj artikoloj en Vikipedio havas informkestojn, kie la informo estas donita en tabela formo. Plejparto de tiuj informkesto estas reuzataj sur pluraj paĝoj, kaj pro tio ili estis kreitaj kiel dinamikaj ŝablonoj, kies enhavo estas ŝanĝata depende de la aktuala artikolo (ekmeple, se temas pri artikoloj pri urboj, oni povas indiki diversajn urbonomojn, blazonojn ktp). Tiuj ŝablonoj plirapidigas la kreon de plaĉe

kaj samtempe enciklopedie aspektantaj paĝoj.

Ankoraŭ unu grava nomspaco estas “Helpo”, kiu enhavas la dokumentojn, kiuj normigas kaj reguligas la funkciadon de Vikipedio. Krom banalan helpon pri tio, kiel redakti artikolojn, tiu parto enhavas plurajn regulojn kaj principojn de Vikipedio. Por rapida referenco al tiuj reguloj multaj el ili havas akronimojn, kiujn oni vaste uzas. La plej baza principo de Vikipedio estas la t.n. NPOV, “*neŭtrala vidpunkto*” (de la angla “*neutral point of view*”). Laŭ tiu principo, ĉiu artikolo de Vikipedio devas esti verkita laŭ neŭtrala, senpartia vidpunkto, kaj enteni nur objektivan informon sen opinioj aŭ komentoj. Tiu principo ofte fariĝas ŝtono de falpuŝiĝo por kontribuantoj kun diversaj opinioj pri la problemoj, kio kondukas al la t.n. “redaktaj militoj”. Aliaj gravaj principoj rekomendas, ekzemple, esti amikema kaj afabla kun ĉiuj kontribuantoj de Vikipedio (sendepende de ties statuso kaj kontribuo), ne ataki ankoraŭ freŝajn vikipediistojn (eĉ se tiuj eble kontribuas mise aŭ eĉ ion detruas – ĉar la teknologio de Vikipedio ebligas renversigon de ĉiu, eĉ la plej fatala ŝanĝo), kaj ĉiam supozi bonan intencan malantaŭ la agoj de aliaj kontribuantoj, eĉ se ili ŝajnas unuavide misaj aŭ malbonaj. La reguloj de Vikipedio ne estas rigidaj, sed de tempo al

**Vikipedio:Babel**

<b>pl</b>	Polski jest <a href="#">językiem ojczystym</a> tego użytkownika.
<b>ru</b> 4	Этот участник владеет <a href="#">русским</a> почти как <a href="#">родным</a> .
<b>de</b> 3	Dieser Benutzer hat <a href="#">sehr gute</a> Deutschkenntnisse.
<b>fr</b> 2	Cette personne peut contribuer avec un niveau moyen en français.

Kategorio:Vikipediistoj laŭ lingvo

Mi loĝas en [Pollando](#) en urbo [E](#)

Informo-kesto pri redaktanto de Vikipedio

## Kompartabelo de Vikipedioj en diversaj lingvoj (stato por la 14-a de julio 2007).

Nr	Lingvo	Origina nomo	Wiki	Artikoloj	Prof-undeco	Ĉiuj paĝoj	Redaktoj	Adm	Uzantoj	Bildoj
1	Angla	English	En	1 883 440	323	9 530 350	149 739 392	1 274	4 851 414	756 17
2	Germana	Deutsch	De	610 123	101	1 663 501	35 810 679	283	425 797	109 49
3	Franca	Français	Fr	525 363	62	1 442 626	18 753 971	155	269 112	37 227
4	Pola	Polski	Pl	401 996	15	672 314	9 080 329	130	130 744	17 905
.....										
13	Finna	Suomi	Fi	122 807	40	307 730	3 242 271	43	61 191	9 333
14	Norvega	Bokmål	No	118 796	31	288 279	2 605 263	54	51 105	851
15	Esperanto	Esperanto	eo	86 180	17	196 730	1 147 473	10	3 248	24 579
16	Turka	Türkçe	Tr	85 480	47	256 869	1 999 091	15	97 449	11 228
17	Slovaka	Slovenčina	Sk	72 511	14	140 639	1 075 843	23	8 828	1 804
.....										
26	Lombarta	Lumbaart	Lmo	51 299	0	53 945	142 547	3	276	197

tempo estas plifajngitataj.

Ankoraŭ unu grava nomspaco estas “Portalo”. Portaloj celas unuigi kontribuantojn pri unu certa temo kaj koherigi iliajn kontribuojn. En Esperanta Vikipedio ekzistas portaloj pri matematiko, pri ludoj, pri literaturo kaj kelkaj aliaj temoj. Ili estas siaspecaj subkomunumo enkadre de Vikipedio, kiuj helpas al homoj koni unu la alian kaj konkordigi sian aktivecon en Vikipedio.

### Statusoj, komitatoj kaj maliculoj

Kvankam la bazaj principoj de Vikipedio egaligas ĉiujn kontribuantojn, kelkaj el ili povas ricevi apartajn statusojn. Tiuj statusoj neniel “pligravigas” homojn, sed simple indikas respondecon pri certaj taskoj en la vikipedia komunumo kaj estas signo de fido flanke de komunumo. Ajna statuso povas esti ankaŭ forprenita laŭ la decido de la komunumo (kie ĉiu aparta kontribuanto havas rajton de unu voĉo).

La plej konata “statuso” en Vikipedio estas “administranto”. Administrantoj estas la homoj, kiuj prizorgas la teknikan flankon de Vikipedio, tamen sen iri tro profunden al la kerno de la tuta sistemo. Ili povas protekti kaj malprotekti paĝojn, redakti protektitajn paĝojn (ekzemple por Esperantigi novajn sistemajn mesaĝojn), rapide renversigi ŝanĝojn de aliaj uzantoj en la artikolo, forbari uzantojn, kiuj endanĝerigas funkciadon de

Vikipedio. Administrantoj estas aprobatataj de la komunumo per simpla baloto post mallonga sinprezento de la kandidato.

Alia figuro en Vikipedio estas “burokrato”. Burokrato estas homo, kiu havas ĉiujn funkciojn kaj eblojn de administranto, sed krome rajtas fari aliajn uzantojn administrantoj. Ĉiu Vikipedio havas sian propran burokraton; grandaj Vikipedioj, kie la nomumado de administrantoj okazas suface ofte, havas plurajn burokratojn por efektiviĝi tiujn taskojn. Burokrato, tamen, rajtas nur aljuĝi la statuson de administrantoj (laŭ la decido de la komunumo), sed ne forpreni ĝin. La statuso povas esti forprenita nur de “stevardo”, plia altrangulo, kies ĉefa celo estas prizorgi interprojektajn aferojn. Stevardoj ne estas lig-

itaj al iu certa Vikipedio kaj rajtas forpreni (same, kiel aljuĝi) statusojn en ajna Vikipedio. Kompare al administranto kaj burokrato, stevardoj estas reelektataj kun certa periodeco, kaj por resti stevardo oni devas esti reelektitaj.

Preskaŭ ĉiu Vikipedio (eĉ malgrandaj!) havas sian propran Ambasadon. Ambasadon konsistigas la homoj, kiuj krom la lingvon de certa Vikipedia projekto bone scipovas ankaŭ almenaŭ unu “eksteran lingvon” – ili estas la kontakt-personoj okaze de ajnaj demandoj pri la projekto. Plia tre grava komitato estas la tiel nomata Arbitracia komitato, kiu juĝ-simile pritraktas ĉiujn konfliktojn en Vikipedio, precipe kiam tiuj havas etikan aspekton. Rilate al la Arbitracia komisiono ekzistas ankoraŭ unu statuso en

Vikipedio, la t.n. “uzanto-kontrolisto”. Li estas homo, kiu povas kontroli, ĉu du diversaj kontoj ĉe Vikipedio apartenas al du diversaj homoj aŭ al unu. Tio fariĝas ege grava, kiam dum balotoj oni komencas suspekti manipuladojn ĉe la voĉdonoj.

Cetere, tiujn homojn, kiuj starigas plurajn kontojn ĉe Vikipedio, oni nomas “majstroj de ŝtrumpaj pupoj” kaj la respektivajn kontojn – “ŝtrumpaj pupoj”. Aliaj diboĉuloj en Vikipedio estas la tiel nomataj “troloj” – homoj, kiuj intence provokas aliajn uzantojn al konfliktoj kaj ŝatas spekti tiujn. Sed la plej ofta tipo de maliculoj en Vikipedio estas simplaj “vandaloj”: homoj, kiuj celas detrui aŭ kripligi Vikipedion. Se banalaj vandaloj simple provas forigi la tutan enhavon de artikoloj aŭ meti tie sian ofte ofendan aŭ memreklaman enhavon, pli rafinitaj maliculoj redaktas artikolojn aldonante intencajn falsajojn, kaj okaze de lerta korekto estas ege malfacile distingi tiun vandalan ŝanĝon disde normala redakto. Feliĉe, Esperanta Vikipedio dume ne estas tiel populara, kiel la alilingvaj projektoj, kaj ne altiras tiom multe da intencaj fuŝantoj. Ekde 2007 en Vikipedio oni aldonis la eblon vidi ŝanĝon de ĉiu artikolo sur la paĝo de “Lastaj ŝanĝoj” kiel diferencon

The screenshot shows the Esperanto Wikipedia page for "Dm afd". At the top, there are navigation tabs: "artikolo", "diskuto", "redaktu", "historio", "malprotektu", "forigu", "alnomu", "malaltenu". Below these is a banner for "La antaŭmezido por Vikimania 2007 evis" and a message about the Esperanto version of Wikipedia. The article title is "Dm afd" with a revision date of 01:47, 12. Jul 2007. The article content discusses "50种珍惜生命的态度(有些是屁话)" and lists 6 points about life attitudes. At the bottom right, there is a "Vandalajo" button.

inter la antaŭa kaj aktuala versioj. Ĉiu ŝanĝo, kiam neregistrita uzanto subite forigas grandan parton de la teksto aŭ male – aldonas ion, rapide kaptas la atenton de deĵora administranto kaj estas (okaze de vandalado) rapide renversigata.

### Kriterioj kaj komparoj inter Vikipedioj

Sufiĉe ofte oni fanfaronas pri la relative granda artikolkvanto en Esperanta Vikipedio. Julie 2007 la kvanto de ĝiaj artikoloj estis 86.199. Granda kvanto, ĉu ne? Konsideru, ke tio ja estas la kvanto de la tiel nomataj “veraj artikoloj” – la artikoloj kun enciklopedia enhavo, do, nek paĝoj kun alidirektiloj, nek aliaj nomspacoj de Vikipedio estas kunkalkulitaj. Laŭ tiu ĉi indico Esperanta Vikipedio superis, ekzemple, la turkan, slovakon, cehan, danan, ukrainan, araban kaj multajn pliajn Vikipediojn. Ĉu ne admirinda fakto?

Ni tamen provu pli atente pristudi la situacion. Se ni rigardos iomete retrospektiven, ni vidos, ke la 5-an de Decembro 2003, kiam Esperanta Vikipedio festis sian 10-milan artikolon, ĝi estis la deka Vikipedio laŭ la kvanto de artikoloj, postsekvata de la itala kaj katalana, kiuj havis po ĉ. 5 000 artikolojn. Kiel oni povas rimarki, la katalana ankoraŭ ne sukcesis kreskatingi Esperantan Vikipedion, sed la itala jam estas ne plu atingebla. Do, klare videblas, ke Esperanta Vikipedio evoluas malpli rapide, ol la aliaj Vikipedioj (*ekzemple, malpli rapide, ol la turka, kiu septembre 2007 jam superis la Esperantan – ndr*).

Tamen, ĉu la kvanto de artikoloj estas bona kriterio por juĝi pri “sukceso” de tiu aŭ alia Vikipedio? Malfacilas kredi, ke bona artikolo povas esti verkita de nulo ĝis kompleta formo per unu redakto, aŭ, alivorte, ke oni “per unu plumverŝo” verkis bonan artikolon kaj ne plu redaktas ĝin. Do ne malpli gravas la alia kriterio, la kvanto de redaktoj, aŭ, por esti pli pre-

cizaj, la averaĝa redaktokvanto por ĉiu artikolo. Se ni nun komparas en la tabelo Esperantan Vikipedion kun la turka, ni vidos, ke la lasta havas pli da korektoj malgraŭ tio, ke la artikolkvanto estas malpli granda, ol en nia Vikipedio. Tio montras, ke artikoloj en turka Vikipedio estas pli ofte redaktataj kaj (verŝajne, sed ne nepre) havas pli bonan kvaliton. Eĉ pli valora estas la alia parametro, kiu nomiĝas “profundeco”. Ĝi indikas ne nur kiom da redaktoj averaĝe havas unu artikolo, sed ankaŭ kiom da neartikolaj paĝoj (ŝablonoj, helpoj, aktivaj diskut-paĝoj) havas Vikipedio kompare al la artikol-paĝoj – ja klaras, ke la ekzisto kaj uzado de tiaj paĝoj rekte influas la kvaliton de la artikolaj paĝoj.

Por definitive konsciigi pri senutileco de kvanto-kriterio ni rigardu la plej lastan linion en la tabelo, kie staras Vikipedio en la lombarta lingvo. Mi, verdire, neniam aŭdis pri tiu lingvo, kaj pro nura intereso pri Vikipedio mi eksciis, ke ĝi estas lingvo, parolata en norda Italio. Estas iom stranga fakto, ke tiu ŝajne ne tiel konata lingvo jam havas pli ol 50 mil artikolojn. Tamen, se oni rigardos pli atente, oni vidos, ke la profundo de ties artikoloj estas nulo. Tio signifas, ke post kreo de ĉiu artikolo oni neniam plu redaktis ĝin. Ĉu tio eblas? La miraklo klariĝas, se oni legos kelkajn artikolojn el tiu Vikipedio. Mi provis alklaki la ligilon “hazarda paĝo” kaj vidi, kiuj paĝoj aperas – kelkaj paĝoj, kiujn mi trarigardis, estis tre malgrandaj (kelk-liniaj) kaj temis ĉefe pri malgrandaj geografiaj objektoj (etaj urboj ks.). Kial do tiuj artikoloj aperis en Vikipedio? Evidente, ili estis kreitaj per la uzo de roboto – speciala programo, kiu aŭtomate produktas paĝojn kun (ŝajne) enciklopedia informo. Sufiĉas trovi en la reto tabelon kun la nomoj de urboj, ties fondojaroj kaj loĝantarkvanto, kaj oni tuj povas pro-

dukti milojn da novaj artikoloj. Tiaj artikoloj pufigas Vikipedion, sed (miaopinie) havas neniun enciklopedian valoron. Krom paroli pri urboj, kantonoj kaj komunumoj de diversaj landoj (kio estas sufiĉe fekunda temo), oni povas produkti multajn pliajn artikolseriojn pri steloj, datoj, kemiaĵoj kaj aliaj objektoj. Ĉio ĉi, tamen, estas nur por pligravigi Vikipedion por alioj, ĉar malfacile kredeblas, ke iu vere legas tiujn artikolojn por ekscii pri io.

Tiuj “malvivaj animoj” troveblas preskaŭ en ĉiu Vikipedio; ankaŭ Esperanta Vikipedio havas plurajn “robotajn” paĝojn, inter kiuj la plej multaj estas komunumoj de Italio, urboj de Germanio kaj vilaĝoj de Rumanio. Tiuj artikoloj estas kutime sufiĉe plaĉ-aspektaj, sed prezentas nur tabelan informon pri la objekto.

Koncerne la difinon de “altkvalita artikolo” necesas diri, ke ties difino ege varias de unu Vikipedio al la alia. Tamen en ĉiuj Vikipedioj (ankaŭ en la Esperanta), oni kutimas kategorii artikolojn laŭ ties grandeco kaj kvalito. Tre malgrandaj artikoloj, kiuj konsistas nur el unu-du frazoj sen ligiloj al aliaj artikoloj, estas nomataj *ĝermetoj*. Se ĝermeto ne pligrandiĝas, ĝi riskas esti forigita. Plia ŝtupo de maturiĝo estas *ĝermo*: ĝi devas havi almenaŭ tri sencohavajn frazojn pri la artikolobjekto kaj almenaŭ unu ligilon. Tamen, eĉ tiaj artikoloj ne estas vere enciklopediaj kaj devas esti pligrandigitaj. Veraj artikoloj, se ili estas sufiĉe ampleksaj kaj bonaj, povas iĝi “legindaj artikoloj”; eĉ pli bonaj artikoloj povas iĝi “artikolo de la semajno” (kies mallonga prezento aperas en la titolpaĝo de Esperanto-Vikipedio) aŭ “elstara artikolo” (fakte, ĉiuj artikoloj de la semajno aŭtomate fariĝas ankaŭ elstaraj artikoloj).

Ĝis nun ni atentis nur artikolkvanton. Sed eĉ pli grava povas esti la kvanto de

Apartenas al:	Jalta municipo
Koordinatoj:	<span><span><span><span>44°<span> </span>29′<span> </span>0″<span> </span>N</span>, <span>34°<span> </span>8′<span> </span>0″<span> </span>E</span></span></span><span><span>﻿</span> / <span>﻿</span></span><span><span>44.48333°<span> </span>N 34.13333°<span> </span>E</span><span><span>﻿</span> / <span>44.48333; 34.13333</span></span></span></span>
Averaĝa alto super la marnivelo:	~20-200 m
Areo:	11 km²
Loĝantaro:	78 800 (al 2006)
— Loĝdenso:	7254,5 hom/km²
Postkodoj:	98600 — 98639
Telefonkodo:	+300-654
Kor-zono:	UTC+2
Antiaj nomoj:	Ĝenja, Jalta
Urbestro:	BRUKO Sergej Borisoviĉ

wikipediistoj – do, la homoj, kiuj regule verkas kaj redaktas por Vikipedio. En la sama tabelo ni vidas, ke nia Vikipedio havas sufiĉe moderan kvanton de uzantoj, iom pli ol 3 mil. El tiuj 3 mil nur 735 redaktis pli ol 10 artikolojn, kaj 230 pli ol 100 (inkluzive robotojn). Do, la ĉefa “laborantaro” de Esperanta Vikipedio estas ĉ. 200 homoj. Se ni tamen pritraktos nur tiujn, kiuj en 2007 ĉiumonate kontribuis per pli ol 5 artikoloj, la kvanto de la kontribuantoj reduktiĝos ĝis 130. Do, la “aktiva” komunumo de Vikipedio estas iom pli ol 100 homoj – sufiĉe malmulte por tiel granda Vikipedio, ĉu ne?

(daŭrigota)

# Vojaĝe tra kelkaj urboj de norda Frankonio

Yenovk Lazian, Francio/  
Germanio

Mi ne plu ŝatas vojaĝi. Flugkompanioj postulas de ni pli kaj pli da... nepostulemo. Pariza flughaveno volis, ke mi ne forflugu, sed senĉese rondiru tra ĝiaj intestoj serĉante la trovendan elir-pordegon. Nurenberga aviadilejo mienis multe pli gaje. Eĉ la suno kaŝrigardis tra nuboj.

Mi tuj sentis min iu gravulo, ĉar miaj gastigontoj venis bonvenigi min triope: Manfred kun la edzino kaj Bernhard. Ni forrapidis tra maldensaj grizaj arbaretoj al Erlangen, kie mi gastos ĉe Bernhard Maurer. Paralele al la ŝoseo, kelkajn metrojn flanken, pasis la biciklovojo. Estis frua vespero, do iuj jam biciklis hejmen. Jen rava libero! Mia biciklo dormas en la kelo, ĉar miaj ĉiutagaj veturbezonoj forte ligas min al la metroo, kaj krom tio, bicikli en Parizo estas tro streĉe.

Erlangen estas urbo fiere memstara. Samgranda urbo en Francio ĉiom dependus de la apuda urbejo kaj estus nur dormejo. La koro de Erlangen estas la firmao "Siemens". Ĉiu urbano aŭ laboras en ĝi, aŭ priveras tiujn, kiuj laboras. Bernhard Maurer ne estas escepto. Li la tutan vivon laboris en "Siemens", kaj nun estras subentreprenon ene de la ĉefentreprenon. La tagordo de Bernhard, kiom ajn libera, estas sufiĉe streĉa. Eĉ malfruvespere, kiam la litoj jam vokas siajn mastrojn, li sidadis ĉe la skribotablo kaj finkalkulis ion, enkovertigis leterojn, skribis kelkliniaĵojn. Tiom laborema kaj laborkapabla, Bernhard tamen estas vivoplena gajulo. Liaj respondoj estas ĉiam rapidaj kaj spritaj. Lia rido tondras dum amikaj kunvenoj. Kaj la amikaj kunvenoj ja oftas. En Erlangen ĉiuj laboras kune aŭ apude. Oni najbaras, la najbareco transkreskas en amikecon, kaj la gorĝo iom seka pro ridbabilado ĉiam volonte bonvenigas kruĉon da biero. Antaŭ mia alveno Bernhard konsilis al mi iom ŝanĝi mian dieton

favore al la loka biero, kiun en Suda Germanio oni trinkas riverkvante. Mi sekvis lian konsilon kaj eĉ ĉampionis tiutere.

La tagordo por la semajno estis delonge preta. Nurenbergo bonvenigis min per pluvaĉo kaj ventego. Triopo da nurenberganoj irigis min tra la malnova urbo, ĝiaj pontetoj kaj preĝejoj. La bomboj ne kompatis la urbon dum la Dua Mondmilito, kaj multaj domoj estis ruinigitaj. Multaj novaj konstruaĵoj tute ne beligas la intermuregan urbokoron. Tamen la konservita parto plene satigas la okulojn per belaĵoj.

Oni kore bonvenigis kaj prizorgis min kaj en Erlangen, kaj en Nurenbergo, tamen mi atendis alian rendevuon: tiun kun mia tre ŝatata desegnisto kaj pentristo Albrecht Dürer. Mi intencis pasigi duontagon gaste en lia hejmo-muzeo, tamen kun bedaŭro trovis malmulte da liaj verkoj. Anstataŭe plene ĝueblas la hejmetoso: mezepoke vestita klarigistino rolis kiel la edzino de la pentristo prirakontante "sian" vivon kun Dürer. En la muzeo, en la desegnejo kaj presejeto laboras artistoj, kies durer-stilaj desegnaĵoj aĉeteblas surloke.

La urbo Fürth preskaŭ kunkreskis kun Nurenbergo. Antaŭe ĉi tie loĝis multe da judoj. Fürth rozkoloras same kiel Nurenbergo. Mi dirus, ke arkitekture ĝi pli harmonias ol ĉi-lastata, ĉar dum militaj bomboj preskaŭ ne trafis ĝin. La ĉirkaŭaĵo de la urbestrejo kaj urbo-konsilejo estas virge antikva. Ĉirkaŭiuri ilin, glitante per la rigardo sur la domfasadoj: ilia ŝaŭmo-ŝtono estas kovrita per belegaj ĉizaĵoj. Se ne malvarmaj pluvo kaj ventego, mi vizitus ankaŭ la judan tombejon.

Ĉiu gapvaganto elektas siagustajn vizitaĵojn. Foje min logas tute ne vidindaj loĝkvartaloj. Mi trapasis kelkajn en ambaŭ urboj. Eĉ se ne samgrade belaspektaj, ĉiuj estis dece puraj, almenaŭ kompare kun la samrangajoj en Francio, kie oni pene evitas enpaŝi ĉiean hundofekon kaj kie la trotuarojn kovras paperaĉoj. En kelkaj kvartaloj multas enmigrin-



La neĝo en Forchheim

KOMPLEZE DE LA AŬTORO



La defenda murego en Nurenbergo

KOMPLEZE DE LA AŬTORO



La urbo Fürth

KOMPLEZE DE LA AŬTORO



La presilo en la domo-muzeo de A. Dürer

KOMPLEZE DE LA AŬTORO

toj: plejparte turkoj, sed ankaŭ serboj, kroatoj, albanoj, italoj kaj ekssovetianoj. Certaj stratanguloj ŝajnas esti tute turkiecaj: kafejoj, kunvenejoj, vendejoj ellasas orientecajn manĝodorojn kaj muzikon. Tamen ĉie regas germaniaj deco kaj ordo.

En Forchheim nin salutis neĝo.

Ĝi belege priŝutis pintajn tegmentojn kaj eĉ promesis resti surtere ĝis la morgaŭa tago. En la urbo oni montris al mi akvomuelejon kaj du bierfarejojn. Unu estis apud la alia, do mi demandis, ĉu ili ne konkurencas. Sed klariĝis, ke iliaj bieroj estas malsamgustaj, do ĉiu havas sian preferantaron.

Se vi veturas tra germanaj urboj senveturile, jen utila konsilo: aĉetu tagbileton, t.e. bileton validan dum tuta tago por ĉiuj transportiloj. La tagbileto aĉetita sabate validas ankaŭ dimanĉe! Ekzistas ankaŭ kelkatagaj biletoj. Se vi vojaĝas kelkope, eblas aĉeti kelkopan bileton, tio kostos

malpli multe, ol kelkaj apartaj biletoj por ĉiu. Ne hezitu kunpreni aŭ eĉ surloke pruntepreni biciklon. Fervoj-vagonoj kaj ofte eĉ subteraj trajnoj proponos lokon por via fera ĉevaletto.

Noto: Frankonio estas regiono de Germanio, troviĝanta en la norda parto de Bavario.

## IJK en Hanojo – diskutforumo pri paco, kunlaboro kaj disvolviĝo

Lai Thi Hai Ly, Vjetnamio

**Ĉirkaŭ 200 partoprenantoj el 35 landoj de 5 kontinentoj venis en Hanojon por partopreni la 63an IJKon, kiu okazis inter la 27a de julio kaj la 3a de aŭgusto 2007. La kongresa temo estis “Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo”.**

La 63-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Hanojo, “la Urbo de Paco” (laŭ la rekono de UNESCO), kvazaŭ atestante la senmortecon de la Zamenhofa ideo kaj la generacian transiron en la 21-an jarcenton. Moderna Vjetnamio estas paca, dinamika, disvolviĝanta lando, kies 85 milionoj da loĝantoj aspiras eniri la estontecon, atinginte kaj konservinte la riĉecon de la kulturoj, potencon de la lando, demokration kaj justecon.

La kongresa temo – “Paco, kunlaboro kaj disvolviĝo” – tuŝas la centrajn hodiaŭajn valorojn. La temo ne nur respogulis ĉies deziron kunvivi pace en la hodiaŭa mondo, sed ankaŭ baziĝas sur la spertoj de la vjet-

namoj, kiuj travivis longdaŭrajn kaj terurajn militojn dum la 20a jarcento. La kongreso ĝuis grandan apogon de diversaj organizaĵoj kaj iĝis vere granda festivalo por junaj esperantistoj de la mondo. Dum sep tagoj ĉiuj ĝojis, konatiĝis, ekskursis kaj malkovris la kulturojn de diversaj landoj. Dank’ al la ludoj, kantoj kaj dancoj de diversaj landoj la partoprenantoj povis bone konatiĝi unu kun la alia kaj senti sian apartenon al unu granda familio. La kulturoj de kvin kontinentoj intermiksiĝis forme de kontent-esprimo sur la feliĉaj vizaĝoj.

Dum la sep tagoj de la kongreso okazis multegaj prelegoj, raportoj, diskutoj, kelkaj distraj kultur-vesperoj. Estis tuŝitaj ankaŭ multaj temoj, rilataj al la Esperanto-movado. Oni povis ekscii pri Lucien Peraire – franca esperantisto, kiu en la jaroj 1928-32 bicikle vojaĝis tra la mondo vizitante multajn landojn, inkluzive Vjetnamion. Oni povis spekti la filmon pri Zamenhof-familio kaj interparoli kun la aŭtoro de la libro “La Zamenhof-strato”. Oni povis



ekscii pri la vivo de romianoj du mil jarojn antaŭe, pri ILEI, pri kulturo kaj Esperantomovado de Togolando, Japanio kaj Aziaj landoj. Oni povis konatiĝi ankaŭ kun la japana Yumeiho-terapio kaj vjetnamaj kurac-plantoj. Dum la vespera programo oni vizitis Hanojan noktan bazaron, admiris Surakvan Pupteatran Spektaklon, rigardis multajn E-filmojn pri Vjetnamio, Litovio kaj Israelo. En la Internacia Vespero ĉiu lando prezentis sian specialan artan programon kun tradiciaj vestaĵoj. Sukcesis ankaŭ la Internacia Festivalo de Lingvoj kaj Gastronomioj: dum du horoj oni povis fari mondvojaĝon, renkontiĝi kun popoloj el pli ol 30 landoj, vestitaj per tradicia kostumo, gustumi japanan sakeon, italan vinon, germanan brandon, kaj – ĉefe! – interparoli rekte, sen interpretado.

La ferma ceremonio finiĝis per la tradicia vjetnama kanto pri amo, tradukita en Esperanton: kvin internaciaj paroj, vestitaj per vjetnamaj tradiciaj kostumoj, konkursis interpretante tiun kanton. Oni povis konvinkiĝi, ke la amo estas ĉiea, eterna, kaj nur la esprimo de amo malsamas depende de kulturo. Kaj tiu amatora interpretado ja simbolas amon, internacian amon, kaj Esperanto estas la ligilo de tiu amo. Ni vere sentis, ke la monda kulturo unuiĝis en tiu momento.

La 63a Internacia Junulara Kongreso pasis vere sukcese. Ĝi certe estis bona kontribuo por atingi la pli bonan mondon.



# Demando pli konvinka, ol la respondo



Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

**“Tielas vivo” de “Kore”; miksoformata KD kun 17 titoloj (60 min.), 2 mp3-formaj kantoj, videosesio kaj 15 mp3-aj karaokeaj dosieroj, tekstolibreto; eld. Vinilkosmo, 2007.**

La unua albumo de “Kore”, eldonita en 2000, impresis la plejparton de la Esperanta aŭskultantaro tre pozitive. Viglaj muzikoj, rafinitaj tekstoj de la unua albumo kun la retorika nomo “Kia viv”, sed ĉefe la bela voĉo de la kantisto Kris Spitzer tuj faris la bandon konata kaj ŝatata. La dua albumo kun la responda nomo “Tielas vivo” certe estis longe atendata.

Komence de la albumo aperas la plej novaj muzikaĵoj de la bando. Kiel tuj rimarkos ajna aŭskultanto, la stilo de “Kore” rimarkeble ŝanĝiĝis – la muzikaĵoj iĝis malpli popular-muzikaj, malpli roke-

caj, sed pli ĵazaj. La ŝanĝo, miaopinie, ne pasis tute senperde – la muzikaĵoj perdis multe da melodieco kaj individueco, tiel karakterizaj por la antaŭa albumo. Nun, malgraŭ la freŝeco de la sonoj, ĉiuj kantoj estas multe pli similaj unu al la alia; preskaŭ mankas al ili vere belaj melodioj. Feliĉe, estas du nepre atentindaj esceptoj – la iom “reliefa” “Pro mi” kaj vere bele-ga malrapida kanto “Promeso via”. Ankaŭ la tekstoj de tiu ĉi parto iĝis pli simplaj kaj samspecaj – nun ili temas ĉefe pri la amo.

Kvazaŭ antaŭsentante, ke la nova stilo dume ne estas same bone ellaborita, kiel la antaŭa, la muzikistoj aperigis sur la sama disko ankaŭ la malpli novajn kantojn, kelkaj el kiuj, ekz., “Nova viv” kaj tre bela “Drag Queen”, fakte estas jam konataj dank’ al la reto. Tiuj 6 “malnovaj” kantoj multe pli similas al la stilo de la antaŭa “Kore”, estas pli buntaj stile, ritme kaj tekste, pli plaĉaj melodie. Fakte, tiu “unuigo” de du preskaŭ tute diversaj “Kore”-oj eble estas bona faktoro por pli bone konatiĝi kun la tuta gamo de stiloj, regataj de la bando, tamen mi persone klare preferas la malnovan “Kore”, kies kantoj ŝajnas al mi pli certaj kaj sinceraj. Iom apartan pozicion en la albumo okupas la tradukita mondfama kanto “The show must go on” de “Queen” – ĝi troviĝas ĝuste meze inter la nova kaj malnova “Kore”-oj; la muzik-aranĝo, prezentita sur la disko estas tute nekutima – pli riĉa harmonie kaj pli simfonia instrumente; por la ŝatantoj de la tradicia muzik-aranĝo

en la disko haveblas mp3-dosiero kun la sama kanto en iom alia muzika vesto.

Se ne konsideri la iom abruptan ŝanĝon de la stilo, ĉiuj antaŭaj meritoj kaj atingoj de “Kore” kaj de Vinilkosmo daŭre aktualas: la registraĵoj estas tre altkvalitaj, la muzik-aranĝoj – altnivelaj, la voĉo de la kantisto – bela kaj lerta, la elparolo – klara, la tekstoj – freŝaj kaj variaj forme, la tekstolibreto – plaĉa (tamen kun iom tro da mistajpoj). Vinilkosmo daŭrigas la tradicion publikigi sur siaj diskoj la videajn dosierojn – ankaŭ ĉi-foje eblas ne nur aŭdi la kantiston, sed eĉ rigardi kelkajn laborajn momentojn de lia ĉeesto en la studio de Vinilkosmo. Krome, haveblas du mp3-dosieroj: unu – kun “Mi brilu plu” (Esperanta adapto de “The show must go on”) kaj la dua – kun Esperanta-franca versio de la kanto “Promeso via”. Kiel nova pimpaĵo de Vinilkosmo sur la disko aperas 15 mp3-dosieroj, kiuj prezentas karaokeajn registraĵojn de preskaŭ ĉiuj kantoj de la disko (do, ili sonas kvazaŭ veraj kantoj, sed sen la ĉefa voĉo de la kantisto – estas vi, kiu devas kanti). Vere bona nova tradicio!

La disko certe estas tre bonkvalita, varia kaj simple aŭskultinda. Tamen, komparante la stil-evoluon de la bando mi emas konkludi, ke la demando (la antaŭa albumo “Kia viv”) estis tamen pli konvinka, ol la respondo (la nuna albumo “Tielas vivo”). Nu, ni esperu, ke la bando evoluos plu, kaj ke en la novaj albumoj nin atendos eĉ pli konvinkaj kaj variaj muzikaĵoj.

## Ŝimo

Maksim Petrov, Kazahio

**Fine komenciĝis la printempo, kiun ni tiel longe atendis. Jam estas majoj. Neĝo antaŭlonge degelis, malkaŝinte la teron. Preskaŭ ĉie jam verdiĝas herbo. Vetero estas varma, sed la ĉielon ĉiam kovras nuboj. Kaj la sunon ne eblas vidi, bedaŭrinde. Tial en ombroj, en malaltaĵoj, en varmeo kaj malsekeco ekkreskas blanketa ŝimo.**

Ili – familiaraj kaj kriemaj – pretas penetri ĉien. Oni povas facile rekonigi ilin laŭ malmultekostaj sportaj kostumoj kaj

ledaj ĵaketoj, laŭ trikitaj ĉapetoj kaj kaskedoj, laŭ konstanta remaĉado kaj ĉiuminuta kraĉado. Kiel ajn ili aspektas, tiaj ecoj estas komunaj – ĉiam avidaj (kiel malpleneco) manoj kaj pritaksanta elsubfrunta rigardo: ĉu kapti viktimon tuj aŭ poste? Ankoraŭ unu karakteriza signo: masivaj oraj ringoj, surkolaj talismanoj kun suraĵoj el la Korano kaj krucoj. En la poŝoj aŭ sur la zono nepre pendas telefonoj, per kiuj ili aŭskultas laŭtegan pop-muzikon aŭ krimulajn kanzonojn, spektas vulgarejn ŝerc-filmetojn. Se ili interparolas, do certe surdigante

ĉiujn ĉirkaŭulojn. En tiuj ĉi personoj indiferenteco strange najbaras abomenon. Tero, sur kiu ili iris, estas plenkovrita per botelaj pecetoj, ŝiritaj kondomoj kaj uzitaj injektiloj. Kiel la supron de la evoluo tiuj “dukrunuloj” opinias stariĝon sur kvar piedojn – eksidi en aŭtomobilon kaj kun troa rapideco traflugi tra vojo aŭ (laŭbezono, certe) tra trotuaro, timigante preterirantojn per

muĝo de la motoro.

Ili loĝos tie ĉi, en tiaj duonmalhelaj anguloj, formangante la nutraĵojn de la tero kaj de ĉio ekzistanta sur ĝi – dum sufiĉos loko. Kaj, eblas, poste ili komencos vori sin mem. Se pli rapide aperus la suno! Tiuloke dum tiom da jaroj ne aperis vera, klara, varmega somero! Se ĝi aperos, tiu ĉi malfeliĉa tero fine odoros je floroj, sed ne je putraĵo.



Luksa aŭto, ofta fierajo de ŝimo

## Momentaj pensoj pri realeco

Facila

Aneta Ubik, Germanio/Argentino

Tio estas teksto, kiun mi verkas en la momento. Estas simpla fluo de vortoj, de pensoj, de literoj. Tio estas **kontribuo** por *KONTAKTO*. La kontakto kun la realeco. Kiel vi kontaktas la realecon? Kio estas realeco por vi? Ĉu la realeco estas diversa por diversaj homoj?

Nun mi sentas varmon, mi aŭdas bruon, apud mi parolas la kara fratino, la strato **trafikoplenas**, estas vintra vespero en la mezo de la ĉef-urbo de Argentino – tia estas mia nuna kompreno pri la realeco. Sed vi, kara leganto, havas alian realecon. Vi sidas, staras aŭ kuŝas ie ali-loke en la mondo, eble estas mateno, eble nokto, eble vi sentas vin freŝa aŭ eble laca, eble sci-vol-ema aŭ enu-ig-ita, eble-eble-eble...

La realo. En Peruo estis grandega **tertrema** kaj mortis ĉirkaŭ 600 homoj. Kia estas la realeco por la post-vivintoj? Por mi – pens-iga.

Ĉu estas diferenco inter realo kaj realeco?

**kontribui** – fari ion memstare por komuna afero, celo

**tertrema** – malbona okazaĵo, kiam la tero “moviĝas” kaj grave malbonigas domojn ktp.

**trafiko** – ĉiuj movoj de aŭtoj, okazantaj en urboj

## La bona vendado

Du amikoj foje veturis en urbon por vendi vinon. Dum la vojo ili eksidis por ripozi. Unu amiko diris:

– Estus bone trinki iom da vino.

La alia respondis:

– Sed ni ja veturigas ĝin por la vendado! Ne eblas trinki sen mono eĉ unu **guton!**

La unua metis la manon en la poŝon, trovis malgrandan moneron kaj diris:

– Jen monero, vendu al mi iom da vino.

La amiko donis al li iom da vino, prenis la moneron, poste redonis ĝin kaj diris:

– Kaj nun vi vendu al mi iom da vino.

Tiel la monero vojaĝis de unu amiko al la alia ĝis iliaj vinujoj mal-plen-iĝis. Kaj la amikoj ekdormis tute feliĉaj pro bona vend-ado.

**guto** – akv-ero, mal-grand-ega kvanto de akveca aĵo

\*\*\*

## Kia saĝa hundo!

– Kian belan hundon vi havas! Ĝi ver-ŝajne estas ankaŭ tre saĝa?

– Certe! Hieraŭ dum la vespera promenado mi diris al ĝi: "Ŝajne, ni ion forgesis". Kiel vi pensas, kion ĝi faris post tio?

– Ne-kred-eble! Ĉu ĝi ek-kuris hejmen kaj al-portis tiun forgesitan aĵon?

– Ne, ĝi eksidis kaj komencis pensi, kio ĝi estas.

Facila

### JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

– aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;  
– havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;  
– rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

*modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), enhavo tre varia: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.*

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <[www.junaamiko.inf.hu](http://www.junaamiko.inf.hu)> aŭ en <[www.lernu.net](http://www.lernu.net)>!

### Abonkotizo por KONTAKTO por la jaro 2007

Lando/valuto	Kto	Italio/eŭro	22	ALIAJ LANDOJ:
Aŭstralio/dolaro	34	Japanio/eno	3000	Luksemburgio laŭ
Aŭstrio/eŭro	22	Kanado/dolaro	31	Belgio; San-Marino laŭ
Belgio/eŭro	22	Malto/eŭro	15	Italio; Kipro kaj
Brazilo/eŭro	10	Nederlando/eŭro	22	Slovenio laŭ Malto;
Britio/pundo	15	Norvegio/krono	170	Liĥtenŝtejno laŭ
Ĉeĥio/krono	460	Nov-Zelando/dolaro	40	Svislando; Bulgario,
Danio/krono	160	Pollando/zloto	46	Latvio, Litovio kaj
Estonio/eŭro	12	Portugalia/eŭro	22	Rumanio laŭ Estonio.
Finnlando/eŭro	22	Rusio/eŭro	10	TARIFO A: Honkongo,
Francio/eŭro	22	Slovakio/krono	550	Korea Respubliko,
Germanio/eŭro	22	Svedio/krono	200	Singapuro, Sud-Afriko,
Greklando/eŭro	22	Svislando/franko	32	Tajvano.
Hispanio/eŭro	22	Usono/dolaro	24	TARIFO B: Ĉiuj ceteraj
Hungario/forinto	4100	Islando/eŭro	14	landoj ne jam menciitaj.
Irlando/eŭro	22	Israelo/eŭro	16	
Islando/eŭro	20			
Israelo/eŭro	16			

### FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

#### fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

– revuon *KONTAKTO*

– bultenon TEJO Tutmonde (oficiala organo de TEJO)

– akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso

– aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

### Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

# La finna festo Vappu

Saliko, Finnlando



Multaj homoj venas por rigardi la feston



La studento en la speciala vesto de sia fakultato

**Finoj** kutime festas ne nur la Unuan de **Majo**: studentoj precipe festas ankaŭ la antaŭajn vesperon kaj nokton en la universitataj urboj, el kiuj la plej grava estas la ĉef-urbo Helsinko. En ĉiuj universitataj urboj la loĝantoj ar-iĝas sur tradiciaj lokoj, ofte ĉirkaŭ iu hom-figura **statuo**, kiu ludas gravan rolon en la amuziĝo.

Multaj laborejoj fermiĝas jam post-tag-meze la 30-an de **aprilo** aŭ estas fermitaj la tutan tagon. En la stratoj aperas vendantoj de **balonoj** kaj aliaj amuz-iloj. Multaj studentaj aktiv-uloj vestas sin per la speciala vesto de sia **fakultato**. La vestoj havas atento-vekajn kolorojn. Sur ili bone videblas la reklamoj kaj simboloj de la helpantaj organizaĵoj.

En Helsinko la fest-em-uloj direktas siajn paŝojn al la apudmara vendo-**placo**, kie staras statu-ego de sen-vesta virino en ronda **fontano**. Ĉiuj deziras ĉe-esti je la 18a horo, kiam de sur la lev-maŝino estas fal-igata speciala blanka studenta ĉapelo sur la kapon de la metala vir-in-ego. Tiam oni ĝojkrias, muzikas kaj ŝercadas. La popol-amaso konsistas el dekoj da miloj da gejunuloj kaj centoj da iamaj studentoj. Ilia festado povas daŭri la tutan nokton en dancejoj kaj manĝejoj aŭ simple ĉe geamikoj.

Sur la stratoj dis-er-iĝas vinboteloj, ĉar malmultaj el la festantoj re-metas la malplenaĵn botelojn en sian dorso-sakon. La sekvataga pur-igado de la vendo-placo kostos cent mil eŭrojn al la urbo.

Estas ege bedaŭrinde, ke la studentoj, kiuj devus ekzempli nur bonajn aferojn, sen-pripense dis-ĵet-adas botelojn kaj for-ĵet-ind-aĵojn.

La Unuan de Majo multaj ĉef-urb-anoj ŝatas **pikniki** en granda parko apud la maro. Ankaŭ tie sonas muziko kaj kantoj, kaj lern-aj-anoj povas kolektadi la malplenaĵn botelojn, pro kiuj oni iom pagas al ili. **Sved**-lingv-anoj tradicie piknikas en alia parko, ol finn-lingvanoj, sed la dividiĝo ne estas nepra.

Politikistoj kaj politik-em-uloj havas siajn kun-star-adojn, koncertojn kaj festo-paroladojn sur diversaj placoj. Antaŭ 30-40 jaroj la paŝ-adoj de maldestr-uloj kun ruĝaj flagoj, laboristaj diraĵoj kaj kantoj plenigis tutajn stratojn. En la 1990aj jaroj kaj komence de la 21-a jar-cento tiu tradicio iom post iom malaperis. Kvankam la Unua de Majo estas la Tago de Finna Laboro, la festado kaj amuziĝo de studentoj preskaŭ superas ĝin.

**aprilo, majo** – la dua kaj la tria monatoj de printempo

**balono** – malpeza rond-forma ludilo, kiu povas flugi en aero

**fakultato** – branĉo, sub-divido de universitato

**finnoj, svedoj** – la nacioj, ĉefe loĝantoj en Finnlando kaj Svedio (landoj norde de Eŭropo)

**fontano** – bela loko, en kiu akvo aperas kvazaŭ el sub la tero

**placo** – granda libera loko inter kelkaj domoj

**pikniki** – manĝi (ofte familie) en libera naturo

**statuo** – arta prezentaĵo de la homa korpo



La homoj grupiĝas en la parko